# *Nia vivo ku?as en la fiero esti kubanoj*



**Fiero esti kubanoj, la kuba flago**

Havano, apr 14 (RHK) Defendi la kuban fierecon per la kulturo multe rilatas al tio, kion Fidel petis de ni dum la plej krizaj momentoj de la 1990-aj jaroj: la unua afero, kiun ni devas savi, estas kulturo.

Hodia?, tiu kulturo estas savita per konkretaj agoj celantaj konservi ?in kiel la fundamento de la nacia identeco, kiu trakuris nian sangon ekde la komenco de la formi?o de nia nacio ?is hodia?.

La komplekseco de la nunaj tempoj diras al ni, ke estas nepre debati la kulturajn defiojn de nia tempo, la defiojn alfrontantajn Kubon hodia?, aspektojn asociitajn al la netu?ebla komponanto de la homo, kun ?ia identigo kun la identecaj valoroj, kiuj difinas nin, en malfavora scenaro, en kiu la kulturo imitas aliajn, pli

ortodoksajn metodojn de koloniigo.

?i tiuj kaj aliaj temoj kunvenigis grupon de kubaj intelektuloj kaj artistoj en Camagüey de la 10-a ?is la 13-a de aprilo por la Unua Tutlanda Kolokvo "Fiero esti kubano". La Kolokvo celas krei platformon por kontra?kolonia penso kaj servi kiel spaco por debato kaj pripensado pri aferoj esencaj por la defendo de nia suvereneco.

Historiisto Ernesto Limia plurfoje atentigis, ke arto legitimas politikon. El tio venas nediskutebla misio de kulturo: alfronti la kognan militon, kiu estas farata kontra? ni.

Kaj estas bone scii, ke tiu ?i kulturo defendas la kuban identecon, la Patrujon, la Revolucion kaj la Socialismon, ?ar la historio montras, ke kiam avangardoj distancigas sin de la amasoj, ili ?esas esti avangardoj. Ni ne havas alian elekton, kaj tio estas klara: ni devas gajni la kulturan militon kaj defendi la fierecon esti naskita en tiu ?i lando nomata Kubo.

Fonto: Granma

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/380834-nia-vivo-kusas-en-la-fiero-esti-kubanoj

Radio Habana Cuba